

ESPERANTO

TRIUMFONTO

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsavio).
W. M. Page, adv., Edinburg.
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro,
Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura redaktoro: Zanoni.

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Reinlando,
Germanio.
Poŝtĉeka konto Köln 70865,
por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptoj oni skribu nur
sur unu flanko de la papero.
Skribu ĉion legeble, se eble
per maŝino. Por resendo aŭ
respondo aldonu resp.-kup.
aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al
s-o Teo Jung, Köln-Horrem,
Germanio.

ABONEJOJ
ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administradoj por oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET por propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne.
3 dolaroj, 7.50 guldenoj, 12 svedaj kronoj, 15 svisaj frankoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norvegaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 35 liroj, 60 finnaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 360 hung. kronoj, 1200 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu 100 germ. mk., Rusio 50 gm. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tujan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaroniere 21 mk., aŭ rekte ĉe la administrado Köln-Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 2.— mk.).

JARABONO:
Aperas semajne.
ANONCOJ
kostas po cm² (kvadracentimetro) por ĉiuj landoj 3 gm., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCOJ
kostas po 2 foja enpresoj kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1² jar-abono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1² jarabono); 1 foja enpresoj kostas la samon kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉigo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉefkunsido, fondiĝfestoj ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 65 :-: Edinburg, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :-: 1. Jan. 1922.

Adiaŭ, 1921! Bonvenon, 1922!

Starante sur la sojlo de l' nova jaro, ni konstatis kun ĝojo, ke la pasinta jaro puŝis nian movadon denove grandan paŝon antaŭen. Ni rememoru nur la grandioze sukcesintan kongreson de Praha kun siaj fruktopromesaj antaŭlaboroj kaj siaj riĉrikoltaj postsekvaj! La sola fakto, ke estis eble, allogi kaj kunigi pli ol 2000 homojn el ĉiuj partoj de la tero samtempe en unu loko al potenca manifesto por la enkonduko de lingvo internacia, en tempo tiel maloportuna por vojaĝoj, tiu sola fakto sufiĉas por certigi en ni la konvinkon, ke la tempo de l' ĝenerala utiligo de la helplingva ideo jam estas proksima. Kun tiu firma konvinko ni Esperantistoj eniras ĝoje kaj fideme je la estonteco la novan jaron.

Tamen je tiu ĉi okazo estu permesate elparoli sinĉeran kritikon pri la konduto de multaj Esperantistoj. Mi volas aludi la nesufiĉan seriozecon en nia movado. Ke Esperanto venkos, pri tio jam ne ekzistas dubo ĉe ni. Ankaŭ ke ĝi baldaŭ venkos, pri tio ni estas konvinkitaj. Sed ni povus ankoraŭ pli akceli ĝian venkon, se ni edukus nin al pli granda seriozecon.

Ne sufiĉas belaj vortoj pri kulturprogreso, interpaĉigo de l' homaro, kaj similaj frazoj; ni devas sekvigi agojn kaj oferojn. Nentu bezonas tuj fondi novan Esp. Asocion aŭ novan Esp. Centrejon, aŭ eldoni novan „plej ampleksan kaj plej bellustran“ Esp. gazeton, tio estas eĉ danĝera por nia movado, disligante senbezone la fortojn; sufiĉas la kunagado en jam ekzistanta kaj ekzistebla, elpruvita organizado internacia (UEA), nacia kaj eventuale faka; sufiĉas la abonado kaj kunlaborado ĉe jam ekzistantaj taŭgaj kaj por la hodiaŭa stato de nia movado nepre sufiĉaj internaciaj (ET, „Esperanto“) kaj eventuale naciaj kaj fakaj gazetoj.

Anstataŭ forjeti sian monon per fondado de nova, mortenaskataj entreprenoj, oni oferu la monon ŝparitan per nefondo al gravaj ekzistantaj entreprenoj, eble kun indiko pri uzo de la koncerna sumo por iu speciala celo. Ekzemple, oferante al ET certan sumon por sendi nian ĵurnalon al malriĉaj rusaj samideanoj aŭ propagandacele al infurijaj personoj, gravaj firmoj, komercaj ĉambroj ktp. Sed almenaŭ oni konsentu al niaj necesaj gazetoj kaj precipe organizadoj tiun minimumon je mombuteno, kiun ili nepre bezonas por ekzistadi.

Estas hontinde por la multenombro de la Esperantistaro, ke ĝi apenaŭ pagas 5000 iarkotizojn al UEA kaj eĉ ne 3000 abonojn al ET. Nur la nesufiĉa solidareco de la Esperantistoj estas kulpa, ke la efektive gravaj kaj necesaj Esperantaj entreprenoj devas vivi tiel mizere kaj povas parte nur vegeti. UEA kun 20 000 membroj, ET kun 10 000 abonantoj povus bonege ekzistadi kaj fari vere konvinkan impreson sur la alie indiferentan mondon. Tial ni neniel fondu novajn mortemajn entreprenojn (organizadojn kaj gazetojn), forigu tiujn, kies ekzistado estas necega, nenecesa aŭ nebla kvankam eble dezirinda, kaj subteni nur la efektive gravajn, necesajn kaj vivkapablajn.

ET ja faris bonegajn progresojn en 1921. Ĝia abonantaro kreskis de malpli ol mil al pli ol du mil kaj duono. Ĝia regula eldonnombro jam estas preskaŭ kvar mil. De 1. decembro ĝi estas tute memstara entrepreno kun propra kontoro, propra administrado, propra sekretario ktp. Tamen ĝia ekzistado — pro la nuntempaj malfavoraj cirkonstancoj — ankoraŭ ne estas tiel firma, kiel estas dezirinde, kvankam ne ekzistas kaŭzo por timo. Se — malgraŭ la nova, bedaŭrinde ne plu prokrastebla plialtigo de la abonprezoj — la ĝisnunaj abonantoj restos fidelaj, kaj se en 1922 ni sukcesos gajni ankoraŭ mil novajn abonantojn, ni povos je la fino del venonta jaro ĝoje diri: Nun „Esperanto Triumfonta“ jam estas „Triumfonta“; nun ĝia ekzistado estas nepre firma kaj nesekuebla; jam ĝi fariĝis el komence tre malforta, duba entrepreno, naskiĝinta el la pura idealismo de sia fondinto, jam profitodona negoco; ĵurnalo, kiu pro sia seriozecon kaj sincereco povas impresi la mondon kaj eĉ ne bezonas timi komparon kun naciaj ĵurnaloj.

Por ke tio estu atingata, mi alvokas ĉiujn bonvolajn legantojn de ET kaj ĉiujn seriozajn Esperantistojn, kiuj ankoraŭ ne estas abonantoj, al serioza, solidara kune- kaj kunlaboro! Se ĉiu

San Francisco, la urbo de nia Dekunua.


Nur malmulton aŭdis la Esperantistaro pri „Nia XI-a“, kiu okazis dum la terura kruela militigo (1915) en plenpaca kaj printempa regiono de l' plej okcidenta Ameriko, en San Francisco, la ĉefurbo de Kalifornio.

Ankoraŭ malpli oni aŭdis pri la urbo mem, se oni ne legis en tagĵurnaloj pri la granda tutmonda Ekspozicio, okazinta samtempe en tiu sama urbo.

Tiom pli eble interese niajn legantojn priskribo de la urbo, kun kelkaj bildoj afable senditaj al ni de s-o A. S. Vinzent el San Francisco. La priskribon ni devis bedaŭrinde multe mallongigi, pro la nevenkebla manko de loko en nia ĵurnalo.

Kvar elementoj faras San Franciskon unu el la plej interesaj urboj en la mondo: situo, klimato, vidindaĵoj, popolo.

La urbo kovras preskaŭ kvindek kvadratajn mejlojn sur la pinto de duoninsulo apartiganta la Golfon kaj la Oceanon. La surfaco estas interrompita de dudeko da montetoj, 300 ĝis 750 futojn altaj, kiuj obligas interesan elrigardon el preskaŭ ĉiu fenestro. La golfo, enkadrita de montoj je iom da distanco de la akvobordo, estas 65 mejlojn longa kaj 4 ĝis 10 mejlojn larĝa. Ĝi enhavas 450 kvadratajn mejlojn, kun 80 kvadrataj mejloj da oportuna ankrejo, kie la akvo superas 18 futojn laŭ profundeco. Ĉiuj ŝipoj en la mondo povus flosi samtempe sur la golfo. La elfluo estas la Ora Pordego, mejlon kaj okonon larĝa, kun profundeco de 63 klaftoj. Generalo Fremont tiel nomis la Oran Pordegon pro ĝia simileco al la Ora Korno ĉe Konstantinopolo. Jen la ĉirkaŭaĵoj, inter kiuj oni estas konstruita kaj rekonstruita urbon, kiu devas daŭri por ĉiam.



San Francisco: Strato en hina kvartalo.

ekkonos la pravecon de tia alvoko kaj se ĉiu volonte ĝin sekvas, ne povos forresti, kiun mi deziras al ĉiuj amikoj de ET, al la tuta Esperanta movado, — la

Bonsukceso en la Nova Jaro!
T. J.

San Francisco, unu el la plej viglaj haven-urboj, estas tiom plena je interesaj vidindaĵoj, kiom povas fari loĝantoj el la kvin kontinentoj en tiu ĉi ĉefurbo de sunlando. Pentrinda pejzaĝaro, pitoreskaj konstruaĵoj kaj interesege vivado estas ĉi tie. Malofte kosmopolitismo el orientanoj, latinanoj, teŭtonoj, skandinavo, slavoj, estas superata nur de la amerikanoj, kaj ĉio raso ludas sian propran, tre interesan parton en la konata gastemo, kiun la urbo etendas al ĉiu vizitanto, kaj kiu estas ĝia plej ĝaja posedado.

Neble estas kunpremi San Franciskon en vortan priskribon, tial sufiĉu kelkaj notoj pri ĝia klimato kaj ĉefaj vidindaĵoj.

La termometro en San Francisco mal multe ŝanĝiĝas dum la jaro. La meza

temperaturo en vintro estas 51 gradoj (F), kaj en somero 59. Estas 280 sunplenaĵoj tagoj en la jaro. La plej malvarmetaj monatoj estas januaro kaj februaro, julio kaj aŭgusto. Estas oftaj nebulo kaj refreŝiga marvento. Pluvo estas preskaŭ tute limigita al sessemajna periodo, komencanta en la fino de decembro. Pluvombreloj estas apenaŭ uzataj de majo ĝis novembro.

Kalifornio estas prave konata kiel lando de sunlumo kaj floroj, kaj San Francisco kiel loĝejo agrebla malvarmeta en somero kaj printempevarmeta dum vintro.

Alproksimiĝante al San Francisco de la golfo oni havas vidon de kvar montetoj, ĉiu el kiuj estas ludinta rimarkindan parton en la historio de la urbo. Apud la golfo ĉe la ekstrema nord-oriento angulo de la urbo estas rokplena pinto, Telegrafmonteto, de kies supro, en antaŭaj tagoj, flago signaladis anoncon pri la alveno de la poŝtŝipoj. Ĝin kovras nun la hejmoj de ĉiuj latinaj rasoj, kaj de meksikanoj, havajanoj kaj filipinanoj. Novelistoj kaj poetoj estas priskribintaj la strangan mondon ĉe Telegrafmonteto. Malgrandaj infanoj, mangantaj grandajn krustojn trempitajn en vino, ludas antaŭ la dometoj. Jen pendas ŝnuro da fiŝoj. Tie oni faras sian propran vinon, fromaĝon kaj makaronon. Dekduo da lingvoj kaj dialektoj aŭdiĝas.

Trans la supro de la Pramdomo vidiĝas la blanka Fairmont hotelo sur Nob monteto, kiun Stevenson, Harte, Kipling, Norris kaj aliaj novelistoj estas amplektintaj en siajn rakontojn. La milionuloj de la Comstock minejoj tie konstruis siajn palacojn. La Fairmont hotelo okupas nun tiun ĉi plej rimarkindan elrigardpunkton.

Dunaskitaj montetoj, ĉe la supro de Market strato, staras 750 futojn altaj, kaj subtenas betonan akvujon kun 10 000 000 galonoj da akvo por protekto kontraŭ brulo.

Sola monteto, apud la centro de la duoninsulo, subtenas grandan krucon je memoro de la frutempaj hispanaj misistoj, kiuj alportis civilizadon.

Paroli pri la golfobordo kun la pramdomo la plej vivplena pramstacio en la mondo — kaj la dokoj tro longigus nian priskribon. Jen nur kelkaj vortoj pri la interesa fiŝista kajo.

Estas efektive du kajoj, enfermantaj lagunon, kie ripozas la centoj da malgrandaj boatoj, movataj per gaso aŭ per veloj, kiuj ĉiutage baraktas kontraŭ la minacanta maro por kapti el ĝi la krabojn kaj omarojn por la urbaj bezonoj. Sicilianoj, genovanoj, napolanoj, palermanoj, vestitaj je brilkoloraj ĉapoj, ruĝaj ĉemizoj kaj zonoj, vastaj pantalonoj kaj marbotoj, faras bildon ŝajne transplantitan de la Meztera Maro. Efektive ili estas nur vizitantoj, ĉar dum kvin aŭ dek jaroj ili gajnas sufiĉan sumon kaj reveturas al sia hejmlando, — sed ne por labori.

Mondfamaj pro sia ĉiam verda heleco estas la parkoj de San Francisco. Estas entute 32, el kiuj la plej konata la Parko ĉe la Ora Pordego kun multaj specialaj vidindaĵoj.


La Presidion (militistan rezervejojn) kaj la Fortikaĵojn ni nur volas mencii. Ankaŭ pri la komercaj konstruaĵoj, la 37 bankoj, la 208 preĝejoj reprezentantaj 32 diversajn religiojn, la teatroj, la magazenoj, florbutikoj, kluboj ktp., la civitaj konstruaĵoj kaj la Stanford Universitato ni ne parolas detale. Sed unu intereso de San Francisco ni volas rigardi de lomo pli proksime la hian urbon.

La hina kvartalo okupas 20 kvadratojn sur la flanko de monteto super Portsmouth Placo. Tiu ĉi estas la plej granda spaco loĝata de ĥinoj, ekster Ĥinujo. Ne eĉ granda brulo, kiu tute detruis la domojn de la kvartalo, povis forbruli la atmosferon tie regantan. La nova hina urbo havas la samajn vidindaĵojn, la samajn odorojn, la samajn misterojn, similajn tetrikecojn, templojn kaj „chop suey“ manĝejoj, kaj bazarojn eĉ pli luksajn kaj brilajn ol antaŭe. La vendejoj enhavas la plej bonajn specimenojn de hina arto kaj, kiel la temploj, joss-domoj, teatroj, restoracioj, kaj eĉ kelkaj hejmoj, estas viziteblaj de blankuloj.

La fiŝvendejo de la hina kvartalo prezentas multe da kolor-kombinaĵoj per siaj skvamaj elmontraĵoj. Porkajo estas la preferata vlando. Tutaj porkoj estas rostataj kaj disvendataj po pecetoj. Sukoplenaj vegetaĵoj kaj herboj estas vendataj sur la trotuaroj. Brikaj muroj flamas je koloritaj hieroglifaj anoneoj.

La fumado de opio estas preskaŭ malaperinta afero. Estas ankoraŭ iom da neleĝa enportado de ĥinaj laboristoj. La kvartalo estas plej profite vizitata kune kun rajtigita gvidisto, sed fremduloj povas sendanĝere trapasi lujn el la stratoj.

San Francisco entute estas preskaŭ tute nova urbo. Post la terimoro kaj granda brulo en 1906 duono de la loĝantoj de San Francisco estis devigataj serĉi dormejon en la urbaj parkoj. En la daŭro de tri jaroj la urbo estis denove sufiĉe rekonstruita por prizorgi 30 000 gastojn. Hodiaŭ preskaŭ 2 100 hoteloj, apartamentaroj kaj loĝejoj



San Francisco: Stacidomo de Southern Pacific Fervojo.

(el kiuj 90% estas tute novaj) disponas sin por la senĝena gastigo de centmiloj da vizitantoj. Tri hoteloj distingiĝas de ĉiuj aliaj: la Palace, la Fairmont kaj la St. Francis. La Fairmont hotelo, situanta kiel blanka krono sur Nob monteto, meritas vicon inter la plej noblaj konstruaĵoj de la mondo.

Interesa kaj bela estas ankaŭ la ĉirkaŭaĵo de San Francisco. Sur la orienta bordo de la golfo situas la urbo Oakland. Bela hejmurbo estas Alameda, sude de Oakland. Berkeley estas sidejo de la Universitato de Kalifornio, laŭ nombro de studentoj la unua en Ameriko. Per fervojo oni atingas en kelkaj horoj de San Francisco la Bryon Varmajn Fontojn, Santa Cruz, la Grandajn Arbojn ktp., en unu nokto oni povas veturi al Josemita Valo, Kanjonoj de Sakramenta rivero kaj aliaj mondkonataj vidindaĵoj de l' naturo.

Ni aldonas al nia hodiaŭa artikolo tri ilustraĵojn: la Urbdomon, la Stacidomon de Southern Pacific Fervojo kaj stratn en hina kvartalo. Espereble ni foje sukcesos publiki specialan ilustritan artikolon pri la naturbelaj de Kalifornio en iu venonta numero.

La patro de Esperanto.

Laŭ iniciato de la Ligo Internacia de Virinoj por Paco kaj Libereco oni inaŭguris la 15. decembro memorigan marmortabulon kun la surskribo: „En tiu ĉi domo loĝis en 1905 L. L. Zamenhof, iniciatoro de la lingvo Esperanto“.

La domo estas nun ejo de la nomita ligo.

Ĉeestis la ceremonion s-o ŝtata konsilisto S. Mussard, s-o administra konsilisto Fulpius, s-o kancelero Bret, la vicsekretario de la Ligo de Nacioj Nitobé, la pollanda konsulo Wierczinski kaj aliaj.

En la nomo de la Ruĝa Kruco parolis s-o Horner dirante: Kiel la idealo de R. K., tiel ankaŭ Esperanto naskiĝis en kompatema koro; la celoj estas samaj: ami kaj servi la homaron. Parolis plue s-o Ed. Privat, plue s-o Fuŝisaŭa en la nomo de la orientaj popoloj, s-o Hediger por la Ligo de Malgrandaj Popoloj kaj Miss Kath. Marshall, vicprezidantino de la Ligo. Ŝi diris: Ĉi tiu domo, kiu nun estas la ejo de nia ligo, la domo, kiun ni nomis la Internacia Domo, estas jam per si mem monumento al la spirito dediĉita al la servo kaj propagando de la grandaj ideoj de homara unueco kaj frateco, kiuj inspiris ĝian konstruadon. En la nomo de la Ligo Internacia de Virinoj por Paco kaj Libereco mi deziras bonvenon kaj salutas la insignon de memoro je tiu eminenta homo. Mi promesas, ke ni estos ĝiaj fidelelaj gardistinoj, kaj ke ni disemos inter ĉiujn popolojn sen diferenco de raso, lingvo aŭ religio la homaran spiriton, kiu inspiris Zamenhofon, de raso juda, de nacio pola, de koro kaj spirito kaj pro la lingvo, kiun li eltrovis, unu el la plej grandaj civitanoj de l' mondo.

Malfermita letero al s-o V. N. Devjatnin.

Estinta samideano, kara Vasilij Nikolaevič!

Kelkajn vortojn mi sentas min devigata skribi al vi okaze de via versaĵo „Esperanta Marsellezo“, ĵus aperinta en la n-o 1 (20) de „Sennacieca Revuo“. Ekvidinte vian nomon sub la versaĵo, mi kore ekĝojis, sed traŭginte la verkon, mi estas dolore seniluziĝinta... Ĉu estas eble, ke la sama Devjatnin, nia famekonata poeto-Esperantisto, fiero de rusa Esperantistaro, povus tiel ŝanĝiĝi?! Jam multajn jarojn mi vin konas, ni kune laboris, kaj niaj samsocietanoj ĉiam vin ŝatis kiel fidelan, veran Esperantiston, unu el pioniroj de nia paca movado. Kun respekto ni aŭskultadis viajn parolojn, ni ĝuis viajn verkojn, ni kredis al vi. Kaj jen, kion ni nun vidas? Vi, Esperantisto, ĝis nun portinta la standardon de Interhoma amo kaj paco; vi alvokas al „kruela mortpuno“. Vi postulas la sangon de burĝoj „sin kaŝantaj nun en palacoj“ (?). Apenaŭ mi kredas al miaj okuloj!

Mi povas kompreni, ke vi, estinta burĝo, la sama burĝo, kiel la nun buĉataj de via registaro kaj buĉotaj laŭ via alvoko, — mi komprenas, ke pro ĉiuj motivoj vi faris tian evoluon maldekstren, kaj laĝis eĉ komunisto. Tion mi al vi ne riproĉas, tute ne. Estu komunisto, sed ne kunmiksi Esperantismon kun komunisto. Ĉu paco kaj amo estas atingeblaj per mortpuno? Ĉu tia estas la interna ideo de l' Esperantismo?

Se vi estus nominta vian verkon „Komunista Alvoko“, mi eble nenion kontraŭdirus, sed vi surskribis „Esperanta Marsellezo“! Tion fari vi ne rajtas, ĉar vi kompromitas la vorton „Esperanto.“

Lingvaj Demandoj kaj Lingvosciencia Metodo.

Ĉiu ajn scienco povas atingi sian propran celon nur, se ĝi uzas konvenan propran metodon, kiu taŭgas por la esplorota objekto. Same, kiel ĉiu alia scienco, la lingvistiko devas uzi, esplorante la lingvajn demandojn, la konvenan propran lingvosciencan metodon.

Tiun ĉi tute simplan kaj evidentan principon bedaŭrinde ofte forgesis kaj ankoraŭ forgesas multaj Esperantistoj, kiuj konstante aplikas al la solvo de lingvaj demandoj tian tute fremdan kaj netaŭgan metodon. La matematikistoj certe mokridus ĉiun malsaĝulon, kiu pretendus solvi matematikajn problemojn per biologia aŭ psikologia aŭ historia metodo. Strange estas, ke oni ne miras, vidante matematikistojn aŭ matematikemulojn diskuti pri lingvaj demandoj laŭ tute malforta kaj kontraŭcela metodo, ĉar lingvo ne estas matematikaĵo.

S-o Couturat kaj de Saussure, estante ambaŭ matematikistoj, iniciatis la eraran aplikon de la matematika metodo al la esplorado pri nia lingvo, kaj poste, kelkaj estimindaj Esperantistoj, erarigitaj de la ekzemplo liverita de homoj, kies altvaloru kaj merito estas nediskutebla, ĉiumonate publikas en niaj gazetoj prilingvajn artikolojn, kiuj povus esti ĝustaj kaj trafaj, se ili koncernus eksklude la teknikajn lingvon, sed kiuj estas tute maltrafaj kaj eraraj, se oni pretendas, ke ili koncernas la komunan lingvon.

Al tiaj tro matematikemaj lingvistoj la ĵus publikita, majstra libro de Prof. Aymonier pri la „Derivado en naturaj kaj en artaj lingvoj“ (Essai sur la dérivation comparée dans les langues naturelles et artificielles) prave montras la sekvindan vojon kaj la uzindan metodon. Tiu ĉi pure scienca kaj objektiva libreto, verkita de vera

Kun via 8-a strofo mi povas konsenti: „... Internaciano sen Esperanto estos korpo sen kor“. Vi estas prava, kaj mi aldonos, ke Esperanto sen Internaciano tamen restos potenca koro en la tuthomara korpo!

Plue, se vi estus skribinta „... unuiĝos nur per Esperanto la tutmonda proletariato“, tion mi akceptus; sed vi deziras, ke proletariato unuiĝu por Esperanto: tiaokaze voku proletariojn al paco sur la tero ne per tiaj rimedoj, ne per abomena hombuĉado, sed per reciproka amo.

Vi proklamas kiel sanktan devizon „batalo“ per sangaj rimedoj. Ni, Esperantistoj, ankaŭ estas batalantoj, sed pacaj. Tia vi ankaŭ iam estis! Tial en la komenco de mia letero mi nomis vin „estinta“ samideano.

Granda doloro premas mian koron pro vi. Tamen mi volas daŭre ami vin, kara Vasilij Nikolaevič, ĉar mi estas certa, ke en fundo de via koro restis fajrero de sincera, fundamenta Esperantismo, kaj ke tiu fajrero baldaŭ arde ekflamos! —

P. Medem,

Kovno, Litovujo, 26. 10. 21.

Rim. de Red.: La enpreso de tiu ĉi letero prokrastiĝis pro manko de loko.

Scienco.

T. E. K. A.

La nuna komitato konsistas el:

Honoraj prezidantoj: prof. Gariel, Richet kaj Bergonié de la Franca Medicina Akademio, prof. Broca de la Pariza Medicina Fakultato, d-ro Filippetti, urbestro de Milano, d-ro Mybs en Altona, s-o Artigues, eksa militista kuracisto en Paris, prezidinto de TEKA, kaj generalo Troussaint, eksa kuracista inspektoro de la franca armeo. Prezidanto: prof. Vanverts, dekanato de la Medicina Fakultato en Lille, membro-korespondanto de la Medicina Akademio; sekretario: d-ro Destouches en Paris.

Komerco.

El Franclando.

La komercaj ĉambroj de Brive (urbo kun 22 000 loĝantoj en la departemento de Corrèze; konservoj, grifeloj, ŝtonoj por muŝlioj) kaj de Tulle (ĉefurbo de la sama departemento; 16 000 loĝantoj; ĉevaloj, nuksa oleo, feraĵoj, tolo) voĉdonis por Esperanto kaj tiu de Tulle subvencias Esp. grupon.

Oficiala kurso de Esperanto estas farata de prof. Cart en la Supera Komercia Lernejo en la „Sorbonne“. Tio estas la tria lernejo kun oficiala instruado de Esperanto.

En Mâcon s-o Beau, prof. en liceo, gvidas Esp. kurson kun 40 lernantoj en ejo senpage donita de la komerca ĉambroj, kiu jam tuj post la Paris'a voĉdonis por Esperanto.

La Domo de la Tekniko en Frankfurt a. M.

La laŭplane konstruata Frankfurt'a foir-urbo, kio kunigos sur unu teritorio ĉiujn foirdomojn kaj halojn, en unua tempo estas tre pligrandigata. Oni jam komencis la fundamentojn de la granda „domo de la teĥniko“, t. e. aro de grandaj haloj. Ĝis la printempa foiro 1922 (2. bis 8. aprilo) ega parto de la konstruaĵo jam estos disponebla. En la „domo de la teĥniko“ la grupoj de maŝin-kaj metalfabrikado kaj de elektroteĥniko havos okazon por ekspozici, kia ĝi devas esti postulata de ĉi tiu grava branĉo de nia Industrio.

Foiro en Reichenberg.

Por la tria Internacia foiro en Reichenberg la tagoj de la 12.-20. aŭg. estas fiksataj. Ĉar la

kaj klera lingvisto, konkludas post plena pruvado, ke ne nur la vortkunmetado sed ankaŭ la derivado obeas samajn principojn kaj regulojn en Esperanto kaj en la naturaj lingvoj. „Esperanto, sekvante procedojn, kiuj estas kutimaj al la homa spirito, celas la ŝparadon de la peno kaj la atingon de klareco per plej eble malmultaj rimedoj kaj materialoj, ne starigante apartajn arbitrajn regulojn... Tiel ĝi efektivebligis la maksimumon da naturreco akordigebla kun la maksimumo da logikeco, kaj ĝi trafis plej grandan facilecon kune kun plej granda klareco.“

Esperanto diferencas je la naturaj lingvoj nur per sia pli granda reguleco kaj simpleco, sed Prof. Aymonier pravas per konvinkaj ekzemploj, ke ankaŭ la naturaj lingvoj pli kaj pli emas al reguleco kaj simpleco kaj iom post iom alproksimiĝas al tiuj kvalitoj.

Niaj matematikemaj nunaj lingvistoj, tute same, kiel la Idistoj, rigardas la vorterojn kiel nombrojn aŭ ciferojn, kiuj havas fiksan kaj senŝanĝan valoron; ili diskutas pri la senco de la kunmetitaj aŭ de la derivitaj vortoj konsiderante ilin kiel matematikan ekvacion.

Kontraŭe Prof. Aymonier atentigas, ke „en la naturaj lingvoj neniu kunmetita nek derivita vorto estas plenesprima kaj eksplicita; ke estas plio en la vorto ol en la sumigo de ĝiaj eroj; ke elipso (forlaso de vortero) regas ne nur la vortkunmetadon sed ankaŭ la derivadon“. La samon oni konstatas en Esperanto: en nia artefarita lingvo tute same, kiel en la naturaj lingvoj, ĉia vortiklasa finaĵo, ĉia afikso povas „montri tre diferencajn rilatojn, kiuj restas neesprimataj, ĉar la spirito plenigas la mankon“. La ĝustan signifon precizigas ne nur la kunteksto, sed ankaŭ precipe la natura efektiva rilato de la ideo esprimata de la radikoj kaj la bezonoj aŭ oportunaĵoj de la praktiko.

Ĝisnunaj ekspoz-haloj ne sufiĉis, oni jam pripensas la konstruadon de novaj pli grandaj.

Komerca kaj Industria Ĉambro de Timiŝoara (Temesvar) en Rumanio favora al Esperanto.

La ĉefdelegito de UEA por Rumanio, s-o Andreo Ĉe, proponis antaŭ nelonge al la Komercia kaj Industria Ĉambro en Timiŝoara la akcepton de Esperanto kiel oficiala lingvo. La ĉambro respondis tute favore, skribante inter alie jenon: „Vian alvokon ni akceptis kun granda intereso kaj, konsiante pri la avantaĝoj de Esperanto por la internacia komerco, ni volonte proponas nian helpon en la kiel eble plej larĝa disvastiĝo de l' internacia helplingvo. La manieroj de nia kunhelpo ni fiksoj baldaŭ.“

La dokumento havas la numeron 6773—1921. (Timiŝoara estas granda industria urbo en la „Banato“, nova landparto de Rumanio, ĝis la militfino aparteninta al Hungario.)

La Komercovojaĝista Asocio de Svedlando, sekcio Gefle, rekomendas Esperanton.

La 19. dec. s-o Leander Tell, sekretario de la Sveda Ligo por Internacia Komercia Lingvo, paroladis pri la internacia komerca lingvo antaŭ la grava Komercovojaĝista Asocio, sekcio Gefle, kiu unuanime akceptis jenan rezolucion:

„La Komercovojaĝista Asocio de Svedlando, sekcio Gefle, en ordinara kunsido en Gefle, lundo la 19. dec. 1921, volas per tio ĉi, sciiginte pri la nuntempa movado por komuna komerca lingvo kaj tute konsentinte la kuncelajn arandojn de la komercaj ĉambroj de London kaj Paris kune kun diversaj aliaj oficialaj institucioj, plej varme rekomendi Esperanton kiel internacian lingvon de jam nun gravega signifo kaj rimedon al estontaj pli harmoniaj cirkonstancoj en la multlingva mondmerkato.“

La Asocio volas stalfanke ankaŭ alvoki siajn membrojn kaj la ceteran komercistaron de Svedlando por kunhelpi la baldaŭan akcepton de Esperanto ĉe la komercaj lernejoj de nia lando kaj en nia eksterlanda korespondado.“

Esp. Kongresoj.

La Franca Esp. Kongreso 1922

okazos, laŭ definitiva decido de la Societo Franca por propagando de Esperanto, je pentekosto en Béziers.

Kompletigo al la 5-a komuniko por la XI-a Germana Esperanto-Kongreso en Breslau (vidu ET n-o 63).

La kongrespartoprenontoj estas petataj, konservi la kvitancon pri la pagita kongreskotizajo. La kongreskartoj estos disdonataj en la akceptejo post prezentado de la nomita kvitanco.

Laboristaro.

En Antwerpen (Belgio)

s-o W. Swalf parolis la 7. dec. en la Socialista Popoldomo pri „Esperanto kaj la laborista movado“. Sekve de tio kurso komencis la 19. dec. kun 55 gepartoprenantoj; gvidanto s-o Swalf.

Laborista Esp. Grupo München (Germ.)

malfermis 7 kursojn kun 180 geanoj. La centra grupejo estas en rest. Westermühle, Holzstr. 24 (kunveno merkrede vespere).

Harmonio en Pollando?

La 25. nov. okazis en Warszawa la dua kunsido de la provizora komitato por prepari tutpollandan Esp. kongreson. La komitato konsistas

Estus tre dezirinde, ke ĉiuj Esperantistoj, kiuj interesas sin pri lingvaj demandoj kaj volonte pridiskutas ilin, atente tralegu la majstran verkon de Prof. Aymonier kaj plene profitu ĝin. Tio evitigus al ili tro oftajn diskutojn kaj tro akrajn kritikojn, kiuj estas bazitaj sur principa IDISTA eraro. Ekzemple ili ne kritikis la vortojn KOREKTI, dirante, ke ĝi estas neĝusta kaj malbona, kaj ke oni devas atingi taŭgajn ĝin per la vorto KOREKTI. Ĉar la finaĵo -i kun adjektivo egalvaloras NUR „esti“, sekve la vorto KOREKTI signifas ESTI KOREKTA, sed ne povas signifi IGI KOREKTA. Tia matematika rezono estas maltrafa: la finaĵo -i egalvaloras nek „esti“ nek „fari“ nek iun alian vorton; la U. V. simple instruas, ke -i montras la verbon. Do se oni aldonas la finaĵon -i al adjektiva aŭ substantiva radikoj, oni ne povas trovi la signifon de la ricevita verbo per simpla adicio, la ĝustan rilaton inter la radikoj kaj la derivita verbo difinas kaj precizigas nur la naturo de la ideo kaj la bezonoj de la praktiko. Nu, ĉar en la praktiko oni neniel aŭ trege malofte bezonas unuvortan verbon por signifi „esti korekta“, dum kontraŭe oni ofte bezonas verbon signifantan „igi korekta“, la verbo rekte derivita de la radikoj nature ricevas tiun ĉi plej oftan kaj plej bezonatan signifon. La samo estas pri FIKSA kaj FIKSI, ABSTRAKTA kaj ABSTRAKTI, BUKO kaj BUKI, KONFUZA kaj KONFUZI, KORKO kaj KORKI, LOKO kaj LOKI, REGULO kaj REGULI ktp.

Alia formo de la matematika kaj Idista maltrafa rezonmaniero estas la konfuzo inter la komuna kaj la teknika lingvo, aŭ, pli ĝuste, inter la bezonoj de la komuna kaj tiuj de la teknika lingvo. Certo estas, ke oni ne povas difini fiksaĵajn limojn inter ambaŭ, tute same, kiel oni ne povas precize distingi kaj difini, kie finiĝas la blondeco kaj komenciĝas la bruneco. Tamen certe estas, ke ekzistas vere kaj pure blondaj haroj kaj ankaŭ vere kaj pure brunaj haroj, sed la mezkolraj estas nedistingeblaj. Tiamaniere oni ofte ne povas

el: s-o Domoslawski, s-o Essigman, s-o Resicki, f-ino d-ro Muszkatblat, s-o d-ro Robin, s-o Zajaczkowski, s-o Zys (el Lodz). Kiel sekretarino estis elektata f-ino Muszkatblat. Post vigla interdiskutado la komitato decidis kunvoki kongreson de ĉiuj Esp. socioj kaj grupoj de Pollando en Warszawa dum Pasko 1922.

Pro tio la antaŭ nelonge provizore fondita Esp. Asocio de Polujo, estrita de s-o Prengel en Bydgoszcz, decidis interrompi sian memstaran laboron ĝis la kongreso, kie oni volas komune preparoli la organizadon de la pollanda Esperantistaro kaj kie oni espereble venos al plena harmonio kaj konkordo.

Ĉiuj pollandaj grupoj kaj izoluloj, ankaŭ la dek grupoj kaj la izoluloj organizitaj de EAP resp. aliĝintaj al ĝi, bonvole interrilati en aferoj de la kongreso kun f-ino d-ro Muszkatblat, Warszawa, Krochmalna 15.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

La Brazila Registaro kaj Esperanto.

Je la 12-a de novembro, d-ro Epitacio Pessôa, prezidanto de la Brazila Respubliko, ricevis la antaŭe permesitan viziton de komitato konsistanta el s-oj inĝ. Alberto Couto Fernandes, prez. de Brazila Ligo Esperantista, d-ro Nuno Baena, prez. de brazila klubo „Esperanto“ kaj inĝ. A. C. de Arruda Beltrao, prezidinto de la Organiza Komitato de l' VI-a Brazila Kongreso de Esperanto, kiu lin dankis pro la sankcio de la parlamenta rezolucio. per kiu Brazila Ligo Esperantista estas konsiderata kiel societo de publika utileco.

La Prezidanta Moŝto diris, ke li ĝin sankcis tute plezure, ĉar li estas konvinkita, ke la internacia lingvo Esperanto estos tre utila al la homaro, dank' al ĝia facileco kaj logiko, kiujn li mem konstatis post legado de Esperanta gramatiko. Li promesis sian helpon al la propagando de Esperanto kaj precipe al ĝia instruado en la publikaj lernejoj.

La komitato donacis al d-ro Epitacio Pessôa kelkajn Esperantajn librojn, kiujn li danke akceptis promesante ellerni la helpan lingvon tuj, kiam li havos disponeblan tempon.

La ĵurnaloj preparolis tiun viziton, kiu certe plirapidigas la propagadon de Esperanto en Brazilio.

En Leeds (Angl.)

okazos je 21. jan. la kutima graflanda kvaronjara konferenco de Esperantistoj.

El Franclando.

La 14. dec. okazis en Sceaux apud Paris propaganda parolado de s-o Cozic, ŝtatingenero, antaŭ 80 personoj. La 15. dec. la grupo Paris-Nord organizis Zamenhof-feston sub la prezido de prof. Cart. Post parolado pri Zamenhof ses premioj estis disdonataj al lernintoj de kursoj. La Esp. kabaredo „Verda Kato“ festis la 14. dec. la saman naskiĝotagon per brila programo. — Nova grupo en Montpellier (Suda Franc.); adreso: s-o A. Rivière, 22 rue Lamartine. — En Lyon fondiĝis Esp. grupo kaj kurso, organizita de s-o Sinpak, en la Franca-Fina Instituto. Esperanta kurso komencis en luejo de la lernejo „La Martinière“, donita senpage. — Multaj grupoj festis la datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof, inter aliaj tiuj de Béziers (Beziersa Stelo), Perpignan (Verda Stelo kaj Amo kaj Paco, grupo de hispanaj Esperantistoj). „Beziersa Stelo“ sendis telegramon al s-ino Klara Zamenhof kaj d-ro Leono Zamenhof. — En Toulouse estas restarigita Esp. grupo; ĝia prezidanto, s-o Dubois, profesoro ĉe la liceo, gvidas kurson en la

decidi, ĉu iu vorto apartenas al komuna aŭ al fakalingvo, ĉar tio dependas de la stato kaj disvastiĝo de la sciencaj konoj, kaj de la inteligento kaj klareco de tiu, kiu uzas la lingvon. La grado de vortoj TELEFONO kaj AEROPLANO iam certe apartenis al la teknika lingvo; kiu tamen kuraĝus hodiaŭ aserti, ke ili ne estas komunlingvaj?

La vera diferenco inter la teknika kaj la komuna lingvo ne kuŝas en la vortoj, kiujn ili uzas; ĝi kuŝas en la malsameco de iliaj bezonoj kaj praktikaj postuloj. Tute prave diras Prof. Aymonier: „Neniu dubas, ke la scienca kaj teknika lingvo, en kiu la precizeco neniam povas esti tro granda, postulas pli multajn sufiksojn ol la komuna lingvo, pli severan uzadon de tiuj sufiksoj, pli rigidaĵojn kaj pli mallarĝajn regulojn pri la vortkonstruo“. La faka lingvo nepre bezonas absolutan precizecon, logikecon, unuformecon kaj reflekseblecon. Ekzemple ĝi estas tute prava precizigante kaj plimallarĝigante la signifon de la sendifina sufikso UM; sed ĝi plimallarĝigante kaj precizigante nepre malprava, kontraŭfundamenta, danĝera kaj malpermesata, se oni pretendas, kiel faras nun kelkaj Esperantistoj, trudi ĝin al la komuna lingvo.

Ni ne imitu la Idistojn, kiuj erare konfuzas la bezonojn kaj postulojn de la scienca lingvo kun tiuj de la komuna lingvo. Koncerne la efektiva bezonoj de la komuna lingvo, ni neniam forgesu la saĝajn kaj profundajn konsilojn de Zamenhof: „Lingvo absolute logika kaj tute sen idolistemoj estas lingvo sen viva kaj tro peza... Ni ne devas peni, ke nia lingvo estu TRO preciza, ĉar tiam ni nin mem katenus... Tro granda severeco kaj katenado estas superflua. En tiaj okazoj, kie kelka libereco alportas al ni nenian malutilon, kiel ni devus senbezone nin malliberigi? Ju malpli ni okupos niajn kapojn per diversaj „plibonigoj“ kaj ju pli ni simple propagandos kaj riĉigos la lingvon, des pli bone estos.“

Prof. E. Grosjean-Maupin.

komerca lernejo por la lernantoj de l' dirita lernejo. — Parolado en Esperanto kun lumbildoj pri „La Tajdoj kaj iliaj rezultoj“ de s-o Mesny okazis la 23. dec. en kunveno de la Paris'a Esp. Grupo en la Sorbonne. S-o Mesny estas hidrografia inĝeniero en la Mara Ministerio, membro de la franca komisiono en la interligita (interalianca?) komitato de la senfadena telegrafio kaj eksprofesoro en la hidografia lernejo en Le Havre.

Distingo de franca samideano.
La 22. dec., la amerika ambasadoro Myron Herrick en Paris transdonis al nia samideano prof. Bergonié, de la medicina fakultato de la Universitato de Bordeaux, medalon „Edward Longstreht“ de la Franklina Instituto, pro liaj aplikoj de elektro-magnetismo por trovo de kuglopecoj en vundoj, kio savis, laŭ la vortoj de l' ambasadoro, dek milojn da vivoj dum la milito.

Nederlando.
En Amsterdam okazis bone vizitita propaganda kunveno (la 8. dec.) por la sekcio de la Ned. Fed. de Lab. S-o A. Kloeke paroladis pri „Esperanto en la laborista movado“, s-o Faulhaber pri la XIII-a. Lia parolado estis ilustrita per lumbildoj pri la kongreso. Kurso sekvis.
En Rotterdam s-o Isbrücker paroladis la 28. nov. por la sekcio Rotterdam de „Nederl. Reisvereniging“.

En Beverwyk s-o G. Woud el Wormerveer gvidas kurson kun 16 p.
En Wormerveer du kursoj, katolika kaj laborista.
En Heemskerk du kursoj por katolikoj (unu por s-oj, unu por s-inoj) kun 16 resp. 6 p.

„Germana Esperantisto“
(adreso: Dresden A, Struvestr. 40), raportas en sia decembra numero pri jenaj lokoj:
Aue kurso ĉe popola altlernejo, 14 p.
Auerbach ĉe la Esp. Lernejo: 2 kursoj kun 42 seminarianoj, 2 aliaj kursoj por 60 personoj, kurso por 20 instruistoj.
Braunschweig kurso por 30 p., 3 kursoj por policianoj.
Chemnitz kurso por 9 blinduloj, alia por 9 instruistoj.
Elbing kurso ĉe komerca lernejo kun 50 p.
Essen ĉe Akademaj Kursoj, 60 p.
Esslingen 3 kursoj kun 50 p.
Hamburg kaj Altona 5 kursoj.
Hattingen kurso por 35 p.
Merseburg 2 kursoj kun 23 p.
Mindelheim fondiĝo de nova grupo.
Mühlhausen i. Thür. kurso.
München 2 kursoj por policianoj kun 50 p., 3 perfektigaj kursoj por poŝtistoj kun 60 p., aliaj kursoj, i. a. 7 inter laboristoj kaj 6 inter katolikoj.

Nürnberg kursoj ĉe popola altlernejo, 60 p.
Schwiebus kurso kun 15 p.
Seiffhennersdorf kurso kun 26 p.
Striegau kurso.
Traunstein kurso kun 20 p.; en Laufen apud Tr. kurso por 10 instruistoj.
Uelzen Esp. ekspozicio subvenciata de la urbo per 300 gmk., kurso en Unterlüss apud Uelzen.
Weiden i. B. kursoj kun pli ol 100 p.
Werdau 2 kursoj ĉe popola altlernejo, 36 p.
Wiesbaden po 1 kurso por 7-9 instruistoj, 18 lernantoj kaj 2 por 26 policianoj.
Worms, parolado, 2 kursoj; krome ĉe popola altlernejo 4 kursoj.

Pri diversaj el ĉi-supre menciitaj kursoj ET jam raportis en antaŭaj numeroj.
Pri varbvespero en Auerbach (Germ.)
ni ricevis tre impresan priskribon de nia bulgara amiko A. D. Atanasov, kiu partoprenis la bonege sukcesintan varbvesperon. Bedaŭrinde la manko de loko ne permesas al ni publikigi la raporton.

En Oppeln, Supra Silezio,
s-o d-ro Th. Langer, estro de la Esp. grupo, gvidas kurson por poŝtistoj. Gimnazia grupo estas fondita.

En diversaj partoj de Sakslando (Germ.)
nia afero bone progresas. Petite de lokaj grupoj aŭ interesuloj, s-o Lohmann (Oberlössnitz-Dresden) faris prop. paroladojn en Glashütte, Geising, Radebeul, Oschatz kaj Zittau. Ĉie okazis kursoj, aliĝis novaj kunbatalantoj. Precipe en Glashütte, kie oni fabrikas mondfamajn poŝtorloĝojn kaj precizilojn, kaj en Geising, frekventata vintro-sportejo, oni esperas viglajn futmondajn interlatojn per Esperanto.

Liberurbo Danzig.
Inter polaj Danzig'anoj multe propagandas s-o redaktoro Boleslaw Kielbratowski per paroladoj kaj artikoloj en la de li eldonata gazeto „Echo Gdanskie“. Li aranĝis ankaŭ unuan kurson de Esperanto por poloj en Danzig.

Esperanto en Pola lando.
(Raporto de Pola Esp. Servo.)
Biala Podlaska. Kurso kun 30 personoj, gvidata de s-o Urmacher.
Bydgoszcz (Bromberg). Mardon la 13. dec. la „Societo Esperanto“ solenis la datrevenon de la naskiĝotago de d-ro Zamenhof. Prelegis s-o Prengel; deklamis s-o Nasiatek kaj f-ino Jedrujewska. — Fondiĝis faka socialista grupo; prez. s-o Pankratj, redakt. de „Volkszeitung“.

Deblin-Irena. D-ro A. Sochacki kaj f-ino Zylberglej fondis Esp. rondon. Kurso por 10 p.
Lodz. 3 elementaj kursoj kun 130 p. — S-ano O. Berman aperigas regule Esp. angulojn en „Lodzianin“ kaj „Neue Lodzer Zeitung“.
Miedzyrzecz. S-o H. Brukarz gvidas Esp. kurson. Aliĝis al nia movado d-ro Kaplan.
Miloslaw. Fervore propagandas poŝtestro Prabucki. Okozas kurso, kiun partoprenas la urbestro s-o Knapik, la fervoja staciestro s-o Jozierski kaj kelkaj geoficistoj.
Olkusz. La ĉi-tiea „Pola Esp. Societo“ kalkulas 33 membrojn. S-o Witkowski, fondinto de la societo, forlasis nian urbon, transloĝinte al Torun (Thorn).

Poznan (Posen). 3 kursoj (2 polaj, 1 germana) gvidataj de s-anoj Borkowski, Brzezinski kaj Kalibke. Fondiĝis rondo de germanaj samideanoj.
Telaki. Propagandas el Philadelphia reveninta s-ano Zysk.
Warszawa. Fondiĝis komitato preparanta tulpollandan Esp. kongreson dum Pasko 1922. Al la komitato apartenas s-oj Domsowski, d-ro Essigman, Resicki, d-ro Robln, Zajaecowski, Zys (el Lodz) kaj f-ino d-ro Muszkatblat kiel sekretariino.

Zychlin. Propagandas d-ro Soloniewicz kaj pastro Szlenk.

Prengel, gvid. de P. E. S.
Esperanto en Lodz.
La konata en Pollando librejo de Ludwik Fiszer en Lodz eldonas esp librojn. La firmo preparas por preso lernolibron de Esperanto por poloj de Bronislaw Kuhl kaj originalajn poemarojn de St. Braun (Elski) kaj St. Karolczyk (Eska). Estas merito de s-o Wlodz. Pfeiffer, kiu sukcesis konkiri la firmon por Esperanto.

Jurista Societo „La Difesa“ en Lugano (Svis.)
de ĉiuj fondi bibliotekon-librejon kun Esperantaj literaturaj kaj presaĵoj. Volonte ĝi akceptas Esp. gazetojn kaj librojn. Adreso: Via Maghetti 2, al s-o Aloysis Cappello.

Novaj sukcesoj en Italio.
En decembro komencis la instruado de Esperanto ĉe la Reĝa Instituto Naŭtika (pli ol 200

lernantoj) de Bari sub la gvido de prof. A. Lacalendola de la Komerca Universitato kaj del. de UEA. La direktoro de l' instituto, prof. Michele Manna, zorgis multe pri Esperanto. Oni ŝuldas ankaŭ dankon al s-ano prof. Alberto Alessio, kiu multe helpis per sia aŭtoritato. — Okaze de la datreveno de la naskotago de d-ro Zamenhof fondiĝis en Bovisa (Milano) nova Esp. grupo. Paroladis s-o Busso kaj elokvente s-o Camelli. Baldaŭ estos komencata kurso.

En Ĉeĥoslovakio
kelkaj grupoj solenis la feston de S-ta Nikolao: La germ. grupo de Reichenberg en gastejo „Franzeshöhe“, la grupo de Kladno aranĝis amuzan vesperon, kiun partoprenis ankaŭ neesperantistoj. En Kladno, cetere, regas vigla movado. S-o Kočí gvidas kurson en publika lernejo. Alia kurseto por policianoj. En libera lernejo instruas Esperanton s-o instr. Janout. Urba konsilantaro subtenas ĉiujare la movadon per 100 kč. Loka gazetaro estas favora. — La Esperantista „Tablogirlando“ en Bratislava (Pressburg, Pozsony) solenis la 14. dec. la datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof; solene paroladis la „girdandestro“ s-o Emilio Wanitsek.

Hungario.
La Budapeŝta grupo kunvenis la 16. dec. en la Socia Muzeo por Zamenhof-festeto, kiu bonege sukcesis. Kelkaj gazetoj aperigis artikolojn tiuokaze pri Esperanto.

Dimanĉon, la 18. dec., estis Zamenhof-festo ĉe la Budapeŝta Laborista Esp. Grupo.
En La Budapeŝta grupo de la Hungara Karpata Societo gvidas s-o Mihajlo Asch, prezidanto de la grupo, kurson kun 10 partoprenantoj.
En Kaposvar d-ro Jozefo Takacs gvidas tri kursojn (1 por laboristoj, 62 p., 1 por oficistoj kaj laboristoj, 45 p., 1 por komercieroj, 21 p.).

Bulgario.
En Jambol s-o P. Petrov estas lektoro de Esperanto en la Geknaba Pedagogia Mezlernejo. Li instruas 35 ĝlernantojn el la III-aj gimnaziaj klasoj.

Aŭstralio.
La lernejestro ĉe la Altlernejo en Williamstown instruas Esperanton kiel laŭvolan fakon al knabina klaso.

Gazetaro.

Pester Naplo, Budapest, enhavis artikolon pri Zamenhof-festo kaj scigon el insulo Madaira pri alveno de ekareĝo Karlo, kiun sendis Esp. korespondanto al s-ano Hevesi (longa artikolo).
Pester Lloyd, Magyarasz. Vilag, Nepszava kaj A Nap, Budapest, enhavis artikolojn.
Le Droit du Peuple, Lausanne, 13. kaj 14. 12. (Artikoloj de s-o Hillpold.)
Neue Zürcher Zeitung, Zürich, Sviz., 18. 12. („La pruvita taŭgeco de Esperanto“, de Rud. Unger.)
Allgemeine Zeitung, Chemnitz, Germ., 11. 12. (Artikolo de s-o Gerlich el Auerbach.)
Auerbacher Zeitung, 10. 12. (Esp. angulo.)
Twenach Dagblad Tubantia en Enschede Courant, Nederl., 25. 12. (Kun tre detala recenzo pri ET.)
Neue Bokblinder-Tidende, Kristiania, 15. 12. (Artikolo de la redaktoro s-o Aas pri la temo, kiel estas bezonate havi Esp. rubrikon en la fakaj gazetoj.)
L'Index des Industries du Cuir, Paris, dec. (Kun rubriko pri la diverslandaj progresoj de Esp.)
V. D. I.-Nachrichten, Berlin NW. 7, Sommerstr. 4a, 7. 12. (La gvidanta inĝeniera gazeto de Germanio, kun artikolo pri Esperanto, de s-o E. Wüster.)
Simplicissimus, 7. 12. (konata germana satira gazeto, kun „spritaĵo“ pri la Esp. kurso ĉe la polica direkcio en München.)
Swiat Pracy, Warszawa, 15. 12. (Longa artikolo pri Esp. movado, mencio de ET.)
Neue Lodzer Zeitung, Lodz, Pol., 4. kaj 11. 12. (Esp. anguloj)
Lodzianin, 25. kaj 28. 11. (Artikoloj pri Esp.)
Nowa Gazeta Kolomyjska, 11. kaj 18. 12. (Esp. kurso.)
Eugenia, Barcelona, okt.-dec. (Esp. kurso.)
Frankfurter Measzeltung, 10. kaj 24. 12.

Prager Measzeltung (germanlingva), Praha, 18. 11. (Artikolo de Friß Koch: La komerca lingvo de l' estonteco.)
Freylum, nov. dec. (Kun artikolo en Esperanto, bedaŭrinde ne senerara)

Recenzejo.

LIBROJ.
L'Esperanto et la lutte des langues (Esperanto kaj la batalo de la lingvoj), de Léon Agourine. 18 1/2: 21 cm. 8 p. kaj kovril. Prezo 50 cts. Havebla ĉe Centra Oficejo Esperantista, Paris, 51 rue de Cligny.
Erika varbilo, kiun ni rekomendas al ĉiu franclingva propagandisto
FLUGFOLIOJ.
ESPERANTO. Svedlingva flugfolio de Svensk Esperanto-Förbundet, Stockholm 1. — 14 1/2: 19 1/2 cm.
GAZETOJ.

La Suda Kruco. Okt.
L'Esperanto. Nov.
Internacia Pedagogia Revuo. Aŭg.-sept.
Agitato. Okt. kaj nov.
Sub la Ruga Standardo. Nov.
La Semisto. Nov.
Arguso. Nov.-dec.
Esperantista Junularo. Nov.-jan.

Parolejo.

108. La sveda karavano al Praha.
Hazarde mi nur antaŭ kelka tempo legis raporton pri la sveda kongreskaravano en n-o 48 de ET, kaj mi miris, ke neniu ankoraŭ revenis al tiu temo en sekvinta numero. La svedaj samideanoj faris multe da propagando kaj sendube havis bonan rezulton, se almenaŭ ĉiuj promesintaj pruvigoj plenumiĝis, sed tamen mi opinias, ke oni ne sufiĉe povas malaprobi la metodon. Ni la zorgu, ke niaj kongresoj ne estigu ridindaĵoj; ĉar kio estus la rezultato, se el ĉiuj landoj pilgrimus karavano al la kongresurbo, kiu simile al la sveda nur kvarone konsistis el Esperantistoj. Esperanta kongreso la estas io alia ol amuziga celo por vakaĵamanta unuigo, kaj ni devas klopodi, ke cent procentoj de la kongresanoj bone parolu Esperanton, kaj ni ne devas celi en la kontraŭa direkto. La ĉielo nin gardu, se la intenco de niaj svedaj amikoj pri pli granda propaganda vojaĝo en la sekvonta jaro realiĝus kaj se aliaj karavanestroj sekvus la ekzemplon. Oni la ankaŭ pripensu, ke oni tiamaniere multe malfaciligas la laboron de la Loka Kongresa Komitato, kaj konsideru, ke estas malkonvene, se granda aro da personoj, kiuj verdire nur vizitas la kongresurbon por havi agrablajn vojaĝojn, malebligas, ke la veraj Esperantistoj trovu bonajn loĝlojn.

Jam la idisto moka diris al mi, ke li aŭdis, ke de la svedaj partoprenintoj en la kongreso de Praha nur tre malmultaj povis paroli Esperanton, kaj li jam rigardis tion kiel pruvon pri la senvaloreco de niaj kongresoj. Je mia granda bedaŭro mi ne povis nei la fakon pri la svedoj, sed mi povis klarigi al li, ke tio nur estis escepto, kaj aldonis, ke mi forie malaprobis la sistemon. Oni atentu, se disvastiĝas la famo, ke eĉ ne duono de la kongresantoj estas Esperantistoj, ni mem estus kulpa, se ni ne energie protestas kaj interkonsentas forlasi metodon, kiu ne estas bazita sur sufiĉe firma fundamento.

Cetere oni ne trograndigu siajn atendojn pri la vera rezultato de tia propaganda vojaĝo. La plimulto de la personoj, kiuj kuniras, ne havas originan inklinton al Esperanto, kaj mi tre timas, ke multaj baldaŭ forgesos sian promeson kaj ke nur kelkaj vere plenumos ĝin. Sed al nia celo, alie teni la dignecon kaj gravecon de niaj kongresoj, la sistemo nur povos malutili. Mi esperas, ke oni nepre forlasu ĝin!
(J. R. G. Jabrucker.)

Kuracistoj Esperantistaj!

La unua numero de la „Internacia Medicina Revuo“ aperos definitive en februaro. Por ke jam la unua numero estu kiel eble plej riĉenhava, mi petas ĉiujn kuracistojn, bonvolu fari referatojn el la nacia medicina gazetaro inter 6—25 linioj, kaj sendi ilin tuj al mi. Mi petas ankaŭ la garantiantojn, ke ili sendu al mi la garantian sumon.

D-ro Karlo Mezei, Budapest, Hung.
VI, Teréz-körut 4.

Kelkaj artikoloj,

kiuj ne povis aperi en la hodiaŭa numero, pro teknikaj kaŭzoj, aperos en venonta numero. Do ne skribu al ni pro eventuala neapero de via artikolo en la hodiaŭa numero!

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.
Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio
Tradukita laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro
Maria Ŝidlovskaja.
(47-a daŭrigo.)

Li ekalientis, maĉis la cigaron per siaj maldikaj, fronte kurbigitaj lipoj kaj, fikse rigardante la junan rason, aldiris:

„Ŝajnas al mi, vi viras la malan vojon, kaj en via maljuneco vi eble deziras surmeŝi vian frakon?“

„Mi esperas, ke ne,“ respondis Nilov. „Tamen, ŝajne, la vagonaro tuj haltos. Tio estas la arbo-segejo, mi elvagoniĝas. Ĝis revido, s-ro Dikinson!“

„Ĝis revido, s-ro Nilov. Mi rezervas por mi miajn demandojn.“

Nilov, prenante sian pakadon, ankoraŭ unu fojon fikse kaj iom hezitante ekrigardis Mateon sed, rimarkinte la akran rigardon de Dikinson, li prenis sian pakadon kaj adiaŭis la juĝiston. Sammomente Mateo malfermis la okulojn, kaj ili kun miro haltis sur Nilov, kiu staris profile al li. Sed dum Mateo frotadis al si la okulojn, la vagonaro haltis rapide, kiel ĝi ordinare faras en Ameriko, kaj Nilov eliris sur la peronon. Post momento la vagonaro jam flugis pluen.

Dikinson reokupis sian antaŭan lokon, kaj la amerikanoj ekparolis pri la ĵus elirinta ruso.

„Jes“, diris la juĝisto, „li estas la tria rusa sinjoro, de mi renkontata, kaj la tria homo, kiun mi ne povas kompreni.“

„Eble... el la adeptoj de Leo Tolstoj?“ supozis lia interparolanto.

„Mi ne scias... Sed videble li ĝuis bonan edukadon,“ daŭrigis la juĝisto medite. „Kaj ĉe

mi li jam kelkfoje preterlasas la plej bonajn ŝancojn. Kiam mi plenumis mian unuan malgrandan masonistan entreprenon, s-ro Deglas — inĝeniero diris al mi: — Mi estas pri vi kontenta, Dikinson. Diru, mi petas, kiaj estas viaj planoj? — Mi ekridetis kaj respondis: — por la unua okazo, s-ro inĝeniero, mi volonte fariĝus prezidanto. — S-ro Deglas ridis kaj diris: — Bravo, Dik! Mi ne povas garanti al vi la prezidantecon, sed vi konstruos tutan urbon kaj fariĝos en ĝi urbestro...“

„Ĉi tio ja efektiviĝis“, diris respektplene la plej juna el la interparolantoj.

„Jes“, daŭrigis Dikinson. „Ni komprenas homon tiam, kiam ni konas liajn celadojn. Kiam mi vidis ĉi tiun rusan sinjoron laboranta en mia arbo-segejo, mi lin ankaŭ demandis: — Kiaj estas viaj planoj, sinjoro? — Ĉu vi scias, kion li al mi respondis? — Mi esperas, ke mi rabotos por vi tabulojn ne malpli bone ol tion faras viaj aliaj laboristoj.“

„Jes, ĉio ĉi estas stranga,“ diris unu el la interparolantoj.
Dume Mateo, kiu post la foriro de Nilov ree dormetis, ektremetis kaj ion balbutis tute dormante.

„Jen ankaŭ viro malfacile komprenebla,“ diris unu el la amerikanoj ridetante. „Mi neniam renkontis homon, kiu povus tiom dormi en tia nepoportuna pozo.“

La juĝisto atente ekrigardis Mateon kaj diris: „Mi vetus, ke la animo de ĉi tiu viro ne estas tute — trankvila. Mi ne scias, kien li veluras, sed mi preferus, ke li ne restu en nia urbo. Ho, por tio ĉi mi havas bonegan flarsenton!“

XXIX.
La tintado plifortiĝis, la vagonaro plirapidigis la iradon, la konduktoro eniris en la vagonon kaj prenis bileton de la griza sinjoro kaj de lia

juna najbaro. Poste li aliris la dormantan Mateon kaj tuŝetis lian manikon dirante:

„Debtown, sinjoro!“

Mateo vekigiĝis, malfermis la okulojn, komprenis kaj ektremetis per la tuta korpo. Debtown! La nomon li aŭdis ĉiufoje, kiam nova konduktoro kontrolis lian bileton, kaj ĉiufoje la vorto vekis en li malagrablan senton. Debtown! La vagonaro haltas, oni forprenas la biletojn, do — finiĝis lia vojaĝo, kaj li devas elvagoniĝi... Kion do fari nun, kio atendas lin en tiu Debtown, ĝis kie lia bileto estis aĉetita, ĉar ĝuste por tio sufiĉis lia mono?

En la fenestroj de la vagonoj preterbriletis fajroj de ekstere, kvazaŭ diamantaj pingloj, enpikitaj en la mallumajn montojn kaj arbarojn. Poste tiuj fajroj malsupren kuris ien profunden, respuguliĝis en peco da akvo, tute malaperis, kaj tiam preter la fenestro preterkuris sibilante kaj basfajfante granita rokego en tia proksima distanco, ke sur ĝi klare pentriĝis la flava lumoj de l' vagonaj fenestroj... Poste sub la vagonaro ektondris ponto, denove aperis super la rivero malproksimaj fajroj, kiuj nun suprengrimis ĉiam pli kaj pli altaj, alkuris pli proksimen, enrigardante en vagonojn kaj tuj malaperante malantaŭe. La tintado de la lokomotivo aŭdiĝis seninterrompe, ĉar la vagonaro, nur iom malrapidigite la iradon, flugkuris nun laŭ la ĉefa strato de l' urbo Debtown.

„Ĉu vi rimarkis, sinjoro, kiel ektremetis la fremdulo?“ demandis la juna pasaĝero, kiu videble iom flatis al la maljunulo.

„Mi vidis ĉion“, respondis la juĝisto. „Dik Dikinson prenos siajn rimedojn.“

Post momento en Debtown la domaj pordoj malfermiĝis, kaj la loĝantoj venis renkonten al siaj alvenintaj hejmuloj. La vagono malpleniĝis. La juna sinjoro longe ankoraŭ salutkliniĝis antaŭ

s-ro Dikinson kaj petis lin transdoni saluton a fraŭlino Lucie. Poste li ekrapidis en la urbon, semante ĉe lun maltrankvilon, lun timekscion...

La urbo Debtown estis juna urbo de juna ŝtato. Pasis apenaŭ ok jaroj, de kiam ĝiaj stratoj estis laŭplane markitaj laŭlonge de la nova fervojo, kaj de tiam la urbeto vivis pacan vivon de malmulte vizitata amerika provinco. Kompreneble, la urbo Debtown, meze de sia unutona laborplena vivo, avide englutis la scigon, ke per la lasta vagonaro alvenis viro, kiu al neniu diris eĉ unu vorton, kiu tremetis estante ektuŝata kaj kiu fine vekis grandan suspekton de juĝisto Dikinson, la plej originala sed plej respektinda viro de Debtown.

Forlasinte la vagonon, la juĝisto tuj alvokis la solan policanon de Debtown kaj, montrante la figuron de Mateo, sendecide staranta sur la elektre lumigita perono, diris:

„Atentu, John, kien iros ĉi tiu alveninto. Oni devas ekkoni liajn intencojn. Mi timas, ke ne estos bona tio, kion ni eksclus.“

La policano John Kelly flanks flanken kaj sin kaŝis en ombro de iu ejo, fiera pro tio, ke fine li estas plenumonta sufiĉe delikatan komision.

Tamen al John Kelly baldaŭ ekŝajnis, ke la fremdulo havas neniuman intencion. La viro tute simple eliris sur la peronon sen ia pakado krom malgranda mankorbeo, videble sen la plano de agado, kaj senpense sekvis per la okuloj la forirantan vagonaron. Eksonis signalo, ekbruis la radoj, la vagonaro flugkuris tra la stratoj, aperis post momento en la elektre lumigita spaco antaŭ la apoteko kaj dromis en mallumo, nur la malantaŭe pendanta ruĝa lanterno dum iom da tempo sendadis adiaŭan saluton el la nokta mallumo.

La Lozliĉano ĝemetis, ĉirkaŭrigardante kaj sidigis sur benkon, apud la barilo de la stacidomo.

(Daŭrigota.)

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto - Handelsbureau)
Diernaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas por la dissendo de cirkuleroj.
Prokuras komercajn adresojn.
Prizorgas la anoncadon en Nederlando.
Interrilatiĝas kun nederlandaj komercistoj kaj industrilatoj.
Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

Abonejoj de ET en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchsberg 5, Salzburg.
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beersstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofio.
Ĉeĥoslovaka: Otto St. lenčka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kaserminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 81 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Geron, Rambla Alvarez 12-2.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeliu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5126). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Andreo Ce, Cluj, Transilvanio, Calea Victoriei 129.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Jus aperis:

Babiladoj de Bonhumora Zamenhofano de J. Sapir (Joŝo)
Rekomendita de Esp. Lit. Asocio.

Plej bona kaj amuziga legajo por esp. grupoj. 42 paĝoj, kun ilustraĵoj. Prezo 5 respond-kuponoj stampitaj.

Demandu specialajn prezojn en naciaj valutoj. — Librejoj kaj esp. vendejoj ricevas rabaton je pli granda mendo.

Mendu ĉe Pola Esp. Servo, (Fr. Prengel), Bydgoszcz, Kordeckiego 1a (Polujo).

Registrita Fabriksigno



N-o 242161

ERNST VANOLI

FREIBURG i. Br., Germ., Starkenstr. 19.
Fabrikado de novspecaj ludiloj.
Eksporto ĉiulanden. — Kapablaj reprezentantoj dezirataj.

Per Esperanto

la estro de la fako komerca kaj industria ĉe la urba oficejo de Tokio deziras aranĝi

Ekspozicion de ĉiuspecaj komerc-reklamaĵoj.

Konsiderante, ke tio povas havi bonan propagandan efikon por Esperanto en nia lando kaj ankaŭ en tutmonda komerca rondo, mi petas sendi al mia adreso (Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio) aŭ rekte al s-o S. Kaŝaŝima, faktestro de komerc kaj industrio ĉe la urboficejo Tokio, ĉiuspecajn pendreklamajojn, murafiŝojn ktp. diverslandajn en iliaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Celo de la ekspozicio estas instigi la ĉi-tieajn komercistojn al la plej progresinta moderna reklam-maniero. Al sendintoj la fako komerca kaj industria rekompence sendos japanajn komercajn pend-afiŝojn.

M. Ga, Tokio (Jap.)
Del. de UEA.

Kiam troviĝos sufiĉaj abonantoj, aperos malgranda revuo

La Mondo Politika.

Jara abonkosto 3/6 ŝil., t. e. 14 resp.-kup. Ne sendu monon tuj, sed anoncu vin kiel abonanto.
Oni invitas artikolojn nepagotajn. Bonvolu enmeti kuponon, se necesos respondo.

Redaktoro,
4 Princeton St., London W. C. 1.

Kopilbroj de Günter

por skribado kun aĥato aŭ kraĵono por ĉiuj celoj.
Eksporto al ĉiuj landoj.
Kapablaj reprezentantoj serĉataj.
Emil Günter,
Freiburg i. Br. (Germ.),
Schillerstr. 54.
Fabriko de kopilbroj.

Ĉiu kristana Esperantisto certe abonos por la jaro 1922 la bone redaktitan, multe ŝatatan, neŭtralan, dumonatan, kristanan revuon

Kristana Espero

kune kun la organo de la Kristana Esperantista Ligo

Dia Regno.

Konkurso por abonkolektantoj: Al elekteleblaj premioj apartenas i. a. libera loĝejo en Helsinki dum la XIV-a Kongreso de Esperanto. Por tri abonoj rabato de 20%. Mono akceptata per poŝtmandato aŭ bankbileto.

Redakcio: pastroj H. Päiälä kaj E. Penttinen, verkistino Hanna Rauta kaj s-o H. Salokannel.

Abonprezoj: markoj finnaj 15, germanaj 18, estonaj 75, polaj 300; kronoj svedaj 3, ĉeĥoslovakaj 18, aŭstraj 150, hungaraj 75; frankoj francaj 7, svisaj 4, belgaj 7; levoj bulgaraj 18; diversmone: Brita Imperio 3/5, Nederlando 2,40, Italio 9, Latvio 75, Usono 0,50, Japanio 6.

Specimeno senpage.

Redakcio kaj Kontoro: Kaustinen, Finnlando.

Art-Amikoj,

Artajo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,

kiuj havas intereson por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstraj, turnu sin al Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gletsdorfergasse 5. Favora okazo por eksterlandanoj pro la malalta valuto aŭstria.

Lustroj el Kristalvitro

en ĉiuj stiloj kaj grandoj, elektra aŭ gasa lumigado, fabrikataj laŭ propraj kaj indikataj skizoj.

Ernst L. Hettichnach.

Freiburg i. Br. Germ., Rheinstr. 60.
Eksporto al ĉiuj landoj.
Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj senditan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro,

Béziers (Hérault), Francujo,
3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Nova eksport-objekto! Aparta mur-ornamo!

Mur-bildojn

garantie arte pentritajn per diversaj koloroj sur la interna vitroflanko, laŭ ĉiuj motivoj, en vere bela maniero (grandoj 6:9, 9:12 kaj 15:18 cm) fabrikiĝas kaj eksportas ĉiulanden je mirige malaltaj prezoj

Firmo Emil Weiler, arlaborejo por vitropentraĵo, Freiburg i. Br., Germ., Emmendingerstr. 30.

Kapablaj reprezentantoj dezirataj.

Korespondantoj, atentuj!

Ĉiu el vi havas, kiel mi scias laŭ propra sperto, la deziron posedi fotografiaĵon de sia korespondanto aŭ -ino. Sed la kutimaj fotoj estas hodiaŭ tro multekostaj por tiu ĉi celo. Mi povos al vi liveri por la interŝanĝo tre malmultekostajn

belajn vizitkartojn kun via fotografaĵo.

Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 35 germ. mk. Ĉiu plia linio da teksto kostas 2 mk. pli; por sendkosto aldonu koncernan sumeton. Formato 95:45 mm. Faria laŭ ĉiuj ajn fotografoj, kiu estos resendata sendifekte. Livertempo minimume 4 semajnoj. Alsendo per rekomendita letero.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.

Horloĝoj ĉiuspecaj

poŝ-vektorloĝoj, malgrandaj vekhorloĝoj, star- kaj murhorloĝoj en plej bona kvalito. — Demandu prezaron! — Reprezentantoj serĉataj.

HERMANN TOBUSCH,

horloĝ-eksporto, Freiburg i. Br.
Kaiserstr. 16. (Germanio).

Novjaraj Bondeziroj.

Salutas ĉiujn siajn geamikojn kaj ge-korespondantojn okaze de Novjaro

A. Ferrer Calvo

Str. Asturias, 44-1 Barcelona, Hisp.

FELIĈAN NOVAN JARON ni deziras al ĉiuj niaj amikoj. — Administracio kaj redakcio de ET.

BONAN NOVAN JARON 1922 deziras al siaj konatuloj kaj korespondantoj G. Jönsson, Hällefors.

PRO LA NOVA JARO 1922 gratulas ĉiujn siajn amikojn kaj klientojn J. W. F. Poolen, Zwaanshals 212 b, Rotterdam, Nederlando.

Anoncetoj.

EDUKISTO. Juna germana instruisto, 22-jara, deziras okupadon kiel dominstruisto ĉe eksterlanda germana familio. Adreso: Hermann Petermann, Hagen i. W., Germ., Fleyerstr. 57.

TIPOGRAFIŜTO. Afable sendu ĉiuspecajn efikajn presaĵojn ĉiulingvajn taŭgajn por esti represetaj kiel modeloj en fakturilo ilustrita, aperanta kiel korespondanta propagandnumero. Dankonte: A. von de Held, Leipzig-R., Charlottenstr. 11, III., Germ.

JUNULO. Aliĝu al manuskripta rondiranta gazeto „Junula Revuo“. Subtenu ĝin per kunlaboro. Postulu informojn kontraŭ respond-kuponon. Adresu al Henriko Seppik, Maneŝi 7-12, Tallinn, Estonio.

JUNA SVISA KOMERCISTO serĉas okupadon en Berlino por lerni germanan lingvon. Li scipovas librotendadon, francan, italan kaj Esperantan lingvojn. Unuaklasaj referencoj. Li ŝatas eniri ĉe eksportfirmo aŭ fabriko. Ofertojn sub „Berlin“ peras la administracio de ET.

BERLIN. Juna komercisto serĉas en centro de Berlino bonegan pensionon (belan ĉamboron, matenmanĝon, meztagmanĝon, banon). Ofertojn sub „Pensiono“ peras la administracio de ET.

FILATELISTA CENTRALO. Ni aĉetas ĉiuspecajn poŝtmarkojn, ĉu 10-50 100 serioj, ĉu folioj, ĉu 1000-10000 ordinarij poŝtmarkoj. Serĉas ankaŭ malnovajn leterojn, tutajn kolektojn ktp. Nur ne tro altaj proponoj estas konsiderataj. La samideanoj bone aĉetis ĉe ni kaj certe estas kontentaj. — Gefratoj Fischer, Nürnberg, Fühlerplatz 6, III., Germ.

GRAVA POR FILATELISTOJ. Poŝtmarkoj 10 rubl. rusaj, eldonitaj dum 1906, nestampitaj; prezo 25 gmk., 2 svis. fk. aŭ 3 fr. fk. po peco; ĉe aĉeto de 50 pecoj rabato de 15%. La monon sendu en rekomendita letero al J. Gawronski, skr. poŝt. 22, Bydgoszcz, Pol.

KIU VOLAS ricevi versajojn de Belmont, sendu al mi unu ekzempleron de ia Esperanta gazeto; kiu volas ricevi mian Kres-tomation, sendu tri gazetojn. Ruslando, Moskvo, ĉudovskoj per. N. 6, Komitato de Esperantistoj Svjaz, al M. S. Valentinov.

GAMBRINUS. Kiu povas prizorgi postenon al inteligenta samideano, bier-malto faristo, sciigu afable sub signo „Gambrius“ al administracio de ET.

POLAJ ESPERANTISTOJ! Legu „Swiat Pracy“, organon de Asocio de Laboristaj Kooperativaj Societoj, kiu publikigas konstantan Esp. kronikon. Ricevebla ĉe Księgarnia Robotnicza, Warszawa, Waplna 17.

„GVIDLIBRO DE GIRONA“. — Mendu ĝin ĉe la grupo „Girona Espero“, Urbdomo (Casas Consistoriales), Girona, Hisp. — Belegaj gravuraĵoj kaj detala arkeologia kaj historia priskribo de la urbo. — Prezo unu peseto aŭ alia egalvalora monsumo.

ARTPENTRISTO Georgo Bohutinsky, Praha II., Ĉeĥoslovakio, Palackého nabreží 1672-86 n, pentras per plumo sur koloraj papercartonoj aŭ per karbo motivojn de Praha (kongresejo), kasteloj, ruinoj de Ĉeĥoslovakio. Ankaŭ li faras pentraĵojn laŭ fotografiataj pejzaĝoj el diversaj landoj. Pligrandigas portretojn laŭdeziro. Moderaĵ prezoi. Petu informojn! — Kiu povas havigi al mi vidajkarton aŭ fotografaĵon de la kongresejo de la XIV-a en Helsinki por fari aktualan pentraĵon per plumo aŭ karbo?

ESP. EKSPOZICIO. Fritz Michalek, Reichenberg, Lerchenfeldstr. 20, Ĉeĥoslovakio, kolektas kaj interŝanĝas por konstanta esp. ekspozicio ĉiuspecajn esperantaĵojn, propagandilojn ktp.

ELDONANTOJ KAJ LIBROVENDANTOJ, baldaŭ aperos „La plena lernolibro por rusoj — kun gramatiko kaj du (esperua kaj rusa-esp.) vortaroj“. Publikigu viajn eldonojn kaj firmojn en iu grava kaj multe disvastigita libro. Volu la specialan tarifon peti de P. Hiltrov, Berlin-Charlottenburg, Goethestr. 15, Germanio.

UEA-DELEGITO estas petataj sendigi katalogojn pri belegaj kaj higienaj aparatoj (elektraj masaĝiloj, senharigiloj, harscikigiloj ktp.) al s-o Herschmidt, poste restante, Béziers, Francio.

ET n-ojn 8, 10, 11, 12, 13, 14, 17 kaj 21 deziras aĉeti s-o A. Ferrer, Asturias 44, I, Barcelona, Hisp.

MEZA LITOVIO. S-o W. Kwiecinski, Wilno, Meza Litovio, ul. Żelazna Chaika d. Kielbonskiego, vendas nestampitajn poŝtmarkojn de Meza Litovio: 20 specoj nur 15 germ. mk., forsenditaj en rekomendita letero.

ELDONISTOJ. Kiu volas entrepreni presigadon de libro, malgranda formato, ĉirkaŭ 30 paĝa, kun ilustraĵoj, bonvolu afable skribi, notante samtempe la kondiĉojn, al Adolfo Oberrotman, Warszawa, Pol., Krak-Przedm. 10.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

F-ino Rozallo Wagner, 17-jara komercistino, Timiŝoara IV, bul. Carol I, n-o 9, Ruman., deziras interŝanĝi nur ilustritajn poŝtkartojn kun samideanoj en ĉiuj landoj.

S-o Werner Kluge, Tallinn, Waksaliitn no. 18-2, (Estonio), deziras korespondi kaj interŝanĝi.

S-o Rudolf Rosenfeldt, Tallinn, Waksaliitn 18-1, (Est), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn laŭ katalogoj de Michel 1920 kaj 1921/22.

F-ino Johanna Avik, Tallinn, Estonio, Kadakastr. 9-2, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝanĝas fotografaĵojn.

F-ino Adele Siiberg, Tallinn, Estonio, Mehanikastr. 7, 6, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

F-ino Ellinjo Lübek, Instruistino, Tallinn, Estonio, Manejastr. 10, 13, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj amikaj leteroj kun gesamideanoj de tuta mondo, ŝanĝos fotografaĵojn.

F-ino Adele Lindfors, Finnlando, Wilpuri, Kirkko-saarenkatu 6, as 23, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.

Haapsalu, Estonio, J. Grünthal, pk. 15, deziras korespondi letere kun spertaj gvidantoj de esperantaj kursoj pri pli intensa kaj interesa Instrumaniero.

Haapsalu, Estonio, s-o J. Rand, Kalda 31, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj.

S-o Kopka Stefan, Kisjenő, via Arad, Rumanio, interŝanĝas poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

W. Gulmann, Landhausr. 53 B, Stuttgart, Germ., interŝanĝas poŝtmarkojn nur kun seriozaj kolektantoj per ordinarij leteroj.

Jako Caballé, 21-jara Esperantisto, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj (bfl.) aŭ leteroj, precipe kun gelaboremaj. Adreso: S-ta Galileo 54, Tarrasa, Hisp.

S-o Edy Kotora, Doubravka 220, Ĉeĥoslovakio, elektroteknikisto, deziras korespondi kun amikoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, gazetojn kaj poŝtkartojn ilustr.

S-o Francisko Kias, Timiŝoara III, strato Hattyn n-o 11, Ruman., deziras korespondadi kun esterlandanoj per poŝtkartoj ilustritaj (bfl.) kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.

Adolf Wiesner, Wiesdorf apud Köln, Kölnerstr. 281, Germ., deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj kun la tuta mondo; ankaŭ interŝanĝas gazetojn.

Fraŭlo Robert Hansel, 22-jara, Wiesdorf apud Köln, Schlessbergstr. 34, Germ., deziras korespondadi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustritaj kaj leteroj, nur kun fraŭlinoj.

Pal Dinda, II, Telekhaz g. 5, Temesvar, Rumanio, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

S-o E. Friebe, Instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 24, Dresden-Dobritz, Germanlando, serĉas tutmondajn gekorespondulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj pri ĉiu temo. prefere pedagogia; donas komercajn informojn

S-o Angelo Chisté, Lasino, Trentino, Italio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj leterojn kun ĉiuj landoj. Li korespondas volonte esperante, itale, germane kaj france.

S-ino Walentyna Nikolajczykowa, Lodz (Pol.), Radwanska 51, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, prefere popolajn tipojn.

S-o A. Urmocher, fotografisto, Biala Podlaska, Pol., deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj kaj leteroj.

Tri studentoj volas korespondi kun gesamideanoj eksterlandaj per ilustr. poŝtkartoj aŭ leteroj. Skribu al W. Schubert, Kreuzplatz 2, Trautenau, Ĉeĥoslovakio.

Trautenau, Ĉeĥoslovakio. Studento Erwin Hampel, Beethoveng. 18, kaj Bruno Gahler, Anastasiustr. 3, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

S-o Minŭ, studento de natursciencia fakultato, interŝanĝas poŝtkartojn, leterojn kun samideanoj de ĉiuj landoj. Korespondas pri stenografio, ŝakludo, pri naturscienco, pri Ruslando ktp. Adreso: Pollando, Sienna 72 m. 28, Warszawa.

S-o M. Fivurski, Bydgoszcz, Pol., ul. Grodzka 2, deziras interŝanĝi ĉiuspecajn poŝtkartojn ilustr. kun la tuta mondo.

S-o Mieczyslaw Borucki, Bydgoszcz, Pol., str. Emilia Warminkiego 13, interŝanĝas poŝtkartojn, poŝtkartojn ilustr., gazetojn, leterojn kaj papermonon.

S-o Br. Kruszczyński, Bydgoszcz, Pol., ul. Slemiradzkiego 10, interŝanĝas poŝtmarkojn kun seriozaj progresintaj filatelistoj.

Mi sendas por 20 gmk. aŭ 40 malsamaj nedifektitaj poŝtmarkoj 36 poŝtmarkojn de Meza Litovio. — H. Horodniĉi, Wilno, Sw. Anny 7-7.

S-o A. Kollamaa, Haapsalu, Kalda 31, Estonio, deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.

Leonhard Grassmann, Billrothstr. 41, I, Wien 19, Aŭstrio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bfl.) kun la tuta mondo.

Walter Geppert, Breslau II, Germ., Buddestr. 15, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun samideanoj en ĉiuj landoj.

35 fervore lernantaj geknaboj (11-13 j.) serĉas samajajn gekorespondulojn. Ilustr. poŝtkartojn al instr. Friebe, popola lernejo Dresden-Dobritz, Germanlando.

S-o Svistunov, studento de politeknika instituto, interŝanĝas poŝtkartojn leterojn kun samideanoj de ĉiuj landoj. Ruslando, Saratov, ul. Respublika 40, Esperanta Biblioteko.

William Böttinger, poŝta superaŝefkretario, Werdau, Saks., Germ., deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj leterojn precipe kun kolegoj. Mi ankaŭ provizas provizorojn je memvaloro, prezonte kelkajn poŝtmarkojn al mi.

S-o J. Bernhard, München, Guldeinstr. 32/III. r. deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun eksterlandanoj. Ne sendu unue poŝtk.

F-ino Lene Budjarek, Hohenelbe, Postfach 9 (Ĉeĥoslovakio), parteprenintino al la XIV-a, deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj kun eksterlandanoj.

F-ino Anni Nora Pickert, Hohenelbe, Gartengasse 5, Ĉeĥoslovakio, serĉas gekorespondantojn eksterlandanojn por siaj geleernantoj.

S-o Artur Neubert, Hartmannshof-Knauthain, Bez. Leipzig (Germ.) deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj (bfl.), leteroj, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn.

Böning, Libanostr. 45, Stuttgart, Germ., sendas poŝtkartojn laŭdeziro, poŝtmarkojn, Esp. literaturajn verkojn, Esp. sigelmorkojn, -kartojn kontraŭ poŝtmarkoj uzitaj aŭ neuzitaj kaj Esp. literaturajoj, per ne-enskribitaj leteroj.

S-o H. Singer, München, Sedanstr. 10, II., Germ., deziras daŭran korespondadon kun eksterlandaj fraŭlinoj pri ĉiu temo per belaj poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

S-o Lorenz Brendel, Wiesdorf apud Köln, Wöhlerstr. 19, I. (Germ.), deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun la tuta mondo.

S-ino Emma Broisdorf, Wiesdorf apud Köln, Lichstr. 31, (Germ.), deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun la tuta mondo.

Hans Kubiak, Breslau 5, Gräbschenerstr. 82, Germ., interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Hermann Schmidt, Unteraltenburg 10, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj pri interesaj temoj.

Oswald Wittig, Klausentor 3, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj pri interesaj temoj.

Alfred Müller, juna instruisto, Halleschestr. 117, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri seriozaj temoj (filozofio, psikologio, budhismo ktp.).

Helnz Ewers, Regierung, Abt. Sch. P., Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, per poŝtkartoj, poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Franz Lischke, Roter Feldweg 4, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj, precipe kun instruistinoj, per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Erich Haferkorn, Halleschestr. 117, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

F-ino Marie Schmidt, Unteraltenburg 10, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

S-o Eugeniusz Lubowiecki, Lodz, Pol., ul. Zamenhofs 34, deziras interŝanĝi leterojn kaj ilustr. poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

S-o Hans Hurler, Köln, Chlodwigpl. 26, deziras interŝanĝi Esp. sigelmorkojn, kaj aliajn reklammarkojn de kongresoj, ekspozicioj ktp.

Karl Berthold, Schwanenbergstr. 71, Stuttgart, Würtemberg, Germ., interŝanĝas poŝtmarkojn, precipe maloftajn kaj altvalorejn, sed nur kun tute seriozaj kolektantoj kaj ankaŭ nur per ne-rekomenditaj leteroj (sendas laŭdeziro unue.)

Prokrasti

ni devis multajn anoncetojn pro manko de loko. Ili aperos laŭeble en la venonta numero.